

## ĈIELETO LINDA

Querino Mendoza y Cortes  
Esperantigo: Emanuele Rovere

El la Sierra Morena “Ĉieletto linda” nun venas kanto,  
jen du okuloj nigraj “Ĉieletto linda” de kontrabando.

La muŝon, kiun portas “Ĉieletto linda” vi, ĉe la buŝo,  
al iu ajn ne donu “Ĉieletto linda” por mi ĝin tenu.

Aj, aj, aj, aj kantu ne ploru.

Ĉar, se vi kantas, ĝojigas “Ĉieletto linda” vi ĉiujn korojn.

La birdo, kiu lasis “Ĉieletto linda” la neston sian,  
se trovos ĝin loĝita “Ĉieletto linda” pun’ meritita.

Via hejm’ el la mia “Ĉieletto linda” distancas paŝon,  
kiam mi solas, donu “Ĉieletto linda” vi ĉirkaŭbrakon.

Aj, aj, aj, aj kantu ne ploru.

Ĉar, se vi kantas ĝojigas “Ĉieletto linda” vi ĉiujn korojn.

Sagon en la aeron “Ĉieletto linda” “Kupido lanĉis  
kaj, kia stranga fato “Ĉieletto linda” jen min li trafis.

El la Sierra Morena “Ĉieletto linda” nun venas kanto,  
jen du okuloj nigraj “Ĉieletto linda” de kontrabando.

Aj, aj, aj, aj kantu ne ploru.

Ĉar, se vi kantas, ĝojigas “Ĉieletto linda” vi ĉiujn korojn.